

William Blake,  
La tigro

*tradukita de William Auld*

Tigro, tigro, brile brula  
En arbaro nokt-obskura,  
Forgis kia man' eterna  
Vin je simetri' konsterna?

En kia fundo aū ĉielo  
Ardis via okulhelo?  
Kia lin flugil' subtenis?  
Kia man' la fajron prenis?

Per kiaj ŝultro kaj kompreno.  
Por vi tordigis kortendeno?  
Kaj kiam pulsis batoj koraj,  
Kiaj pied' kaj mano gloraj?

Kia martelo? Ĉeno kia?  
Kia forn' por cerbo via?  
Riskis kia fort' kolosa  
Spiti al terur' ambosa?

Kiam steloj sin malarmis  
Kaj sur la ĉielon larmis,  
Ĉu la verko al li karis?  
Ĉu vin Ŝafid-farinto faris?

...

William Blake,  
The Tyger

Tyger Tyger, burning bright,  
In the forests of the night;  
What immortal hand or eye,  
Could frame thy fearful symmetry?

In what distant deeps or skies  
Burnt the fire of thine eyes?  
On what wings dare he aspire?  
What the hand, dare seize the fire?

And what shoulder and what art,  
Could twist the sinews of thy heart?  
And when thy heart began to beat,  
What dread hand? and what dread feet?

What the hammer? What the chain,  
In what furnace was thy brain?  
What the anvil? What dread grasp,  
Dare its deadly terrors clasp!

When the stars threw down their spears  
And water'd heaven with their tears:  
Did he smile his work to see?  
Did he who made the Lamb make thee?

...

William Blake,  
Der Tiger

*tradukita de Walter A. Aue*

Argiope-informo:  
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.  
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

Tigro, tigro, brile brula  
 En arbaro nokt-obskura,  
 Forĝus kia man' eterna  
 Vin je simetri' konsterna?

*Traduko de la Angla poemo "The Tyger "*  
*de WILLIAM BLAKE (\*1757-11-28 – †1827-08-12) en Esperanton de WILLIAM AULD*  
*(\*1924-11-06 – †2006-09-11).*

*Arg-1048-2127 (2014-06-08 19:35:19)*

*Tiu ĉi poem-esperantigon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la retejo <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/tigro.html>.*

Tyger Tyger, burning bright,  
 In the forests of the night;  
 What immortal hand or eye,  
 Dare frame thy fearful symmetry?

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas WILLIAM BLAKE*  
*(\*1757-11-28 – †1827-08-12).*

*Arg-1048-2125 (2014-06-08 19:43:08)*

*Pri la poeto vidi la vikipediejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/William\\_Blake](http://eo.wikipedia.org/wiki/William_Blake).*

*Traduko de la Angla poemo "The Tyger " de WILLIAM BLAKE (\*1757-11-28 – †1827-08-12) en la Germanan de Walter A. Aue.*

*Arg-1048-2126 (2014-06-08 19:55:12)*

*Tiu ĉi poem-germanigo troviĝas en <http://myweb.dal.ca/wave/Trans/Blake-Tiger.html>.*